

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 29-30 (311-312)

Maio-Junho 1940

Redator responsavel:
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:
Praça da República, 54.
Rio-de-Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondukupoj.

Brazila Ligo Esperantista

La San de Junio nunjara okazis ĝenerala kunsido de *Brazila Ligo Esperantista* kun la ĉeesto de estraranoj, membroj de BKE, reprezentantoj de izolaj ŝtataj membroj kaj delegitoj de la jenaj aliĝintaj grupoj: Brazila Klubo Esperanto, São Paulo Esperanta Klubo, Centro Esperantista de Santos, Esperanta Klubo de Baía, Pernambuka Esperanto-Asocio, Esperanto-Klubo de Santo Amaro kaj Grupo Esperantista "Ismael Gomes Braga". Prezidis la kunsidon s-ro ing. Alberto Couto Fernandes kaj ĝin sekretariis s-ro ing. Hernani da Mota Mendes kaj f-ino Rosa Amaral Malheiro. Post la legado kaj aprobo de la raporto de l' prezidanto oni diskutis kaj aprobis kelkajn ŝanĝojn en la Statuto de la Ligo.

Poste oni elektis la novajn estraranojn de la Ligo, kiuj, kune kun la dumviva prezidanto, s-ro Alberto Couto Fernandes, ĝin direktos dum du jaroj. Jen estas iliaj nomoj: Vicprez. — d-ro Carlos Guimarães Domingues, ĝenerala sek. — ing. Hernani da Mota Mendes, unua sek. — s-ro João Teles da Silva, dua sek. — f-ino Irani Baggi de Araujo kaj kas. — s-ro Odilo Pinto.

Sekve estas aprobitaj proponoj subskribitaj de f-ino Iracema Alvares Coelho, s-ro Adinar Antunes Pinheiro kaj aliaj esperantistoj, por ke oni metu en la protokolon esprimon de granda saŭdado pro la malapero el tiu ĉi mondo de generalo Moreira Guimarães, kiu faris grandajn servojn al Esperanto, kaj kondolencan esprimon pro la morto, ĵus okazinta, de la fervorega esperantisto s-ro Odilon Vidal de Araujo, direktoro de "Pernambuco Esperantista" kaj estrarano de "Pernambuka Esperanto-Asocio".


Laŭ propono de s-roj A. Couto Fer-

nandes, Carlos Domingues kaj H. Mota Mendes, oni aprobis, unuanime, la rezolucion, ke la Ligo donu al la klera kaj sindona samideano s-ro Ismael Gomes Braga la diplomon de "Profesoro aprobata", kiun li meritis pro la verkado kaj publikigo de valoraj libroj en kaj pri Esperanto. Tiun saman esperantiston oni akklamis bonfarinta membro de la Ligo pro liaj valoraj donacoj al tiu ĉi organizaĵo.

Post la dankaj vortoj de s-roj Ismael Braga kaj João Teles da Silva la prezidanto fermis la kunsidon.

La prezidanto de B.L.E., nomis ties helpantoj s-rojn Silio Vaz, José Griner kaj Aron Wiktos, lernantojn de "Kolegio Petro II".

RIO DE JANEIRO. BRAZILIO •



ENIREJO AL GOLFEJO GUANABARA, vidata de sur la monto Corcovado (Korkovado). (Fot. donacita de la Divizio de Turismo de "DIP").

La Familio Zamenhof

Finfine ni sukcesis ricevis ŝajne firdindan informon pri ili. D-ro Adam Zamenhof (la filo de la Majstro), estas en malliberejo en Varsovio; lia edzino kaj liaj fratinoj, Lidja kaj Sofia, estas en alia malliberejo en Polujo; lia filo, Ludoviko, estas libera en Varsovio.

Ni klopodas aranĝi, ke ili komencu novan vivon aliloke, kaj estas espero pri sukceso. La elspezoj, tamen, estos tre altaĵ kaj ni volonte ricevos donacojn por helpi al ili. Oni povas sendi ilin rekte al ni, aŭ, prefere, al la Ĉefdelegitoj kaj Perantoj por transsendo al ni. Se finfine la mono ne estus bezonata, ni resendus ĝin al la donacintoj. Jam ni ricevis pli ol £40.

(El "Esperanto Internacia").

VAMOS LER

D-ro Vieira de Mello, nuna direktoro de la Revuo "Vamos Ler" — la plej legata periodaĵo en Brazilo —, kiu prezidis unu el la solenaj kunsidoj de la 9a Brazila Kongreso de Esperanto kaj tiam faris paroladon, kiun ni publikigis en nia 287a numero, cedis, propravole, al Brazila Ligo Esperantista spacon en ĉiu ĝia numero por la propagando de tiu internacia helplingvo. Tio konsistis el artikoloj por kaj pri Esperanto, notoj pri la Esperanto-movado en Brazilo kaj eksterlande, portugaliaj tradukoj de rakontoj kaj anekdotoj faritaj pere de Esperanto el malmulte konataj lingvoj kaj enigmaj konkursoj kun premioj.

Bonvolu sendi dankan leteron al D-ro Vieira de Mello, laŭ la jena adreso: "Vamos Ler", Praça Mauá, 7 — 4.º and., Rio-de-Janeiro.

La estraro de BLE akceptas kunlaboraĵojn.

RADIO KAJ ESPERANTO

Finiĝis la kurso de Esperanto, kiun disradiis pere de la stacio de "Rádio Vera Cruz" PRE 2 s-ro A. Couto Fernandes.

Daŭras la kvinminuta leciono disradiata ĉiŝaŭde (22.50 — 22, 55), pere de "Rádio Transmissora", s-ro Ismael Gomes Braga.

Meritas specialan atenton de la esperantistaro la ĉiutaga disradiado farita de "Esperanta Klubo de S. Paŭlo" pere de "Rádio Piratininga" PRH 3 (620 kc.). Ĝi okazas de la 18a ĝis la 18.15a (loka horo) kaj disradias lecionojn (lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede), paroladojn, kantojn, deklamadojn kaj muzikojn (merkrede kaj sabate). La lecionoj estas donataj de s-roj Geraldo de Azevedo, Osvaldo de Moraes, Abraão Sarraf kaj Mario Rodrigues Monteiro, kiuj ankaŭ faras paroladetojn. Deklamas en Esperanto kaj portugala lingvo finoj Sarah Fridman, Yvette Ranzani kaj Cordelia Falcione. Ludas muzikon instruistino Jandira Loureiro Rodrigues. De la komenco de la disradiado (25 de Marto) ĝis la 27a de Junio la Klubo disradiis 76 horkvaronajn programojn aŭ 19 horojn.

"O Brasil Esperantista" petas al la estraroj de 1' brazilaj kluboj kaj al la brazilaj delegitoj de I. E. L., ke ili sendu monatan raporton pri siaj propagandaj kaj instruaj laboroj.

BRAZILO - JAPANUJO

En nia antaŭa numero ni publikigis la tekston de la salutletero, kiun nia Ligo sendis al la japana esperantistaro pere de s-ro João Batista Dubieux, kiu vizitis Japanujon, kiel membro de la brazila vizitantaro, veturinta sur la nova japana vaporŝipo "Brasil Maru". Tiu letero estis legita la 29an de Aprilo dum la XXVIII-a Japana Esperanto-Kongreso. La kongresanoj tiam aprobis respondon, kiu ricevis la subskribon de la ĉeestantoj, inkluzive de la guberniestro de Miyazaki, honora prezidanto de la kongreso, kaj de la urbestro de Miyazaki kaj aliaj eminentuloj, patronoj de la kongresoj. "La Revuo Orienta" parolis pri tio en artikolo titolita "Por la Amikeco inter Japanujo kaj Brazilo", kiun ĝi ilustris per la portreto de s-ro J. B. Dubieux. Jen la mesaĝo el Japanujo:

"Karaj Samideanoj.

Via kompleza mesaĝo, kiun vi sendis al ni per respektata sinjoro João Baptista Dubieux kaj kiun la sekretario de Japana Esperanto-Instituto ricevis ĵus antaŭ sia ekveturo al la urbo Miyazaki, al nia XXVIII-a Kongreso kaj portis al ĝi, faris al ni tre agrablan surprizon.

En la signifo festi la 2600-a jubileon de nia imperio, ni okazigis la kongreson nunjaran en la nomita urbo, la ĉefurbo de la provinco Hyūga, de kie venis nia japana gento.

Ni kolektiĝis sub nomitan Kolonon Fundamentan de Universo, starigitan memore de la jubileo, kiel simbolo de la paco de la mondo kaj frateco de la homaro.

Permesu, karaj sinjoroj, profiti la okazon por esprimi nian admiron pro via energia laboro kaj grandaj paŝoj antaŭen, kio devas esti modelo de ĉiulanda esperantistaro.

Kun salutoj de la tuta kongresanaro, ni sendas al vi mil dankojn pro via afableco kaj gratulon pro viaj brilantaj sukcesoj, de viaj koramikoj,

La XXVIII-a Japana Esperanto-Kongreso".

"La Revuo Orienta" aperigis ankaŭ la esperantan tradukon de la artikolo verkita de D-ro Lourival Fontes, ĝenerala direktoro de la "Departemento de Gazetaro kaj Propagando", kiun publikigis la ilustrita revuo "Brasil-Japão", oficiala organo de la "Instituto Brazila de Japana Kulturo", ĉe Placo Getulio Vargas, 2-1º andar, Rio-de-Janeiro.

VOJO RETROVATA

J. Matos Quinaud

Denaskiĝe la vojon homo serĉas tra arego da ĝenoj kaj sufero, inter baroj de trompoj kaj mizero, denaskiĝe la vojon homo serĉas.

Gustan celon helantan neniu vidas; vanajn marŝojn, klopodojn oni faras, kiel blindulo la vojon eraras, gustan celon helantan neniu vidas.

Kredemo aŭ nekredemo ne gvidas homajn paŝojn ĉiam al haveno sendanĝera, al pradia deveno, kredemo aŭ nekredemo ne gvidas.

Nur postmorte vojon retrovas, kiu ĝin serĉas rekte kaj sindone, per bonfaro, korgojo kaj per bon', nur postmorte vojon retrovas.

COMISION ELECTROTÉCNICA INTERNACIONAL

VOCABULARIO ELECTROTÉCNICO INTERNACIONAL

Aprobado en 1938

VERSION CASTELLANA

por el

Comité Electrotécnico Argentino

Especialmente autorizada por la C. E. I.

PREAMBULO

El Comité Electrotécnico Argentino, cumpliendo con su propósito de divulgar en la República Argentina los trabajos de la Comisión Electrotécnica Internacional, aprobada en la Asamblea Plenaria celebrada en Torquay en junio de 1938.

El valor fundamental de este vocabulario consiste en que proporciona a la técnica y a la ciencia una nomenclatura propia y exata de los principales términos electrotécnicos en castellano, inglés, francés, alemán, italiano y esperanto, habiendo sido efectuada su redacción con la colaboración de los más destacados especialistas en la materia de muchos países.

La "Argentina Esperanto-Asocio" ĝentile donacis al "Brazilo Ligo Esperantista" ekzempleron de tiu grava verko, kiu estas samtempe bonega propagandilo de Esperanto. Bonvolu mendi ekzempleron, kies kosto estas: 9 pesoj argentinaj, rekte al la "Comité Electrotécnico Argentino, Paseo Colón 185, Buenos Aires, aŭ al "Argentina Esperanto-Asocio", Misiones 369, Buenos Aires, Argentina.

N E K R O L O G O

Odilon de Araujo

Grandan baton, gravan vundon ĵus ricevis nia movado en Brazilo. La vigla, inteligenta, fervora kunbatalanto Odilon Vidal de Araujo mortis en la tria tago de junio post rapida malsano en Recife, Pernambuco.

Li estis 50-jara, en brilanta vivoformo, en la plej interesa momento de sia laborado, kiam oni devis lin operacii pro antrakso kaj tuj poste li mortis.

Dum dujara laborado por Esperanto en Recife, li montris tian kapablecon, kiam oni tre malofte trovas en la historio de nia movado. Simile al Carlo Bourlet, kiu komencis samtempe lernante kaj instruante Esperanton, Odilon Araujo ankaŭ ne povis antaŭe lerni kaj poste eklabori por Esperanto. Li ĉion komencis samtempe: Li propagandadis, li instruis en kursoj, li prelegis per radio, li redaktis kaj eldonis gazeton, li organizis la movadon, li korespondadis en kaj pri Esperanto kaj samtempe li lernadis mem la lingvon. Esperanto por tiaj homoj estas multe pli ol lingvo. Ĝi estas homama ideo kaj ilin plene ĉarmas je la unua ekvido, je la komenca kontakto. De tiam ili apartenas nur al la movado, al la ideo, kaj sin mem forgesas por pensi kaj revii nur pri la triumfo de Esperanto. Eĉ sian tempon ili forgesas kaj en fantazio antaŭvidas la estontajn generaciojn, kiam la homoj sin reciproke komprenas, kunlaboradas, kaj vivas en paca harmonio.

Tiaj apostoloj de ideo, kvankam tre maloftaj en la mondo, kvankam ne kompreneblaj en sia tempo, estas la veraj gvidantoj de la homa progresado tra la historio. Ili havas tian varman koron, tian fortan volon, ke la homoj intuicie ilin atentigas, ilin sekvas, eĉ ne komprenante ilian idealon. "Fajron sentas mi interne", diris unu el tiuj superaj idealistoj. Odilon de Araujo apartenis al tia speco de fervoruloj, kiuj sentas internan fajron kaj ne ĉesas penadi por sia ideo.

Danke al li precipe, la nombro de la Delegitoj kreskis, la Societo pligrandigis, la gazeto — *Pernambuco Esperantista* — regule aperis, kaj en ĉiu monato prezentis plibonigojn, novajn kunlaborantojn, kuraĝigajn ekzemplojn.

Ne nur ekstere, ankaŭ en sia hejmo li senĉese laboradis; liaj filinoj ankaŭ tuj fariĝis fervoraj samideaninoj. La ideo plenigis lian animon kaj disradiadis senĉese ĉien.

Dum la lastaj horoj de sia vivo, jam en febra deliro, li parolis nur pri nia movado kaj ofte en Esperanto. Kelkajn momentojn antaŭ sia morto li ripetis en Esperanto la preĝojn, kiujn li diris en portugala lingvo en la ĉeesto de la Pastro. Lia filino petis, ke li ripozu en silento, kaj li ĝentile promesis plenumi ŝian peton, aldonante: "Ja, vi estas prava, ĉar iom pli malfrue mi deziras legi mian korespondaĵon". Li silentis, sed bedaŭrinde por ĉiam!

Por memori lian ekzemplon, oni donis lian nomon al la kurso de li komencita. Tia honorigo estas tre prava, sed ne sufiĉa. Lian memoron ni povos inde honori nur per konstanta laborado por la granda kaj nobla ideo, kiu plenigis lian superan Spiriton. Ja, ni ĉiuj devas laboradi kun simila fervoro por la triumfo de la ideo de homa interkompreno, de homa frateco en la mondo.

La gazeto *Pernambuco Esperantista* aperos eble nur unu fojon post la malapero de nia kara samideano, de nia brava kunbatalanto.

I. G. B.

Etelvina de Magalhães

Nur il tagoj pasis post la morto de Odilon de Araujo, kaj jam denove la Anĝelo de la Morto vizitas nian brazilan Esperantujon! La 14^a de Junio mortis nia samideanino Fraŭlino Estevina de Azevedo Magalhães. Ŝi estis fervora esperantistino, animo de niaj Ligoj, kaj pacience instruis la lingvon al siaj junaj fratinoj.

Ŝi estis 35-jara. Orfino de ambaŭ gepatroj, ŝi fariĝis estrino de granda familio konsistanta el gefratoj pli junaj ol ŝi. Ŝi brave venkis sian grandan laboradon, kaj trovis ankoraŭ sufiĉe da tempo por instrui la lingvon, organizi la korespondadon de la knabinoj kaj legi literaturon.

Al ŝiaj karaj gefratoj ni prezentas tutkoran kondolencan.

Kapitano Eliseu Montarroyos

Mortis la 25an de Junio, en Parizo, la klera kapitano Eliseu da Fonseca Montarroyos, emerita oficiro de la brazila militistaro, ĵurnalisto kaj verkisto pri internaciaj aferoj. Li estis reprezentanto de la brazila registaro ĉe la Internacia Intelekta Kooperado kaj kelkfoje oficis kiel ĝia delegito ĉe la Ligo de Nacioj. Li ankaŭ oficiale re-

prezentis Brazilon ĉe diversaj Konferencoj kaj Internaciaj Kongresoj, el kiuj ni citas la 24an Universalan Kongreson de Esperanto, okazintan en Parizo, en 1932. Lia saluto farita en Esperanto tre bone impresis al ĝia ĉeestantaro, konsistanta el pli ol 1600 geesperantistoj el 36 landoj.

En sia kunsido okazinta la 29an de Junio la estraro de BLE decidis meti en la protokolon kondolencan esprimon pro lia morto. Al lia familio kaj speciale al lia fratino ŝino Edith Montarroyos de Moura Costa, eksdirektoro de lernejo, en kiu funkciis kurso de Esperanto, ni kore kondolencas.

PROVERBOJ

Mi tre ŝatas la proverbojn kaj aforismojn.

Per ili la pensuloj, aŭ iu el la anonyma popolamaso, resumas tiun solidan kaj fidindan "sperte faritan scion", kiu ĉiam estas legmonero.

Ili valoras, se tiel mi povas diri, kiel precizaj kaj koncizaj lecionoj pri "eksperimenta filozofio".

Kaj ili havas la praktikan utilon de kelkaj medikamentaj disketoj, bongustaj kaj terapi-efikaj, kiuj facile englutitaj kaj nemalfacile digestitaj, sanige efikas.

Povas esti, ke kelkaj homoj, kutimitaj al la kompakta kaj abunda prozo el la lernolibroj, havas kontraŭ ili la saman antipation, kiam havas tiuj, kiuj pli ŝatas la medikamentajn trinkaĵojn kaj siropojn, ol la sukeritajn pilolojn, kiuj plezurigas la guston.

Rilate min, mi rediras, ke ni ilin ŝatas por la utilo — identa al tiu de la disketoj, kiujn oni kunportas en la veŝta poŝo por engluti sur la strato — permesanta, ke oni lernu tion, kion ili instruas, tra legado en tramveturilo aŭ ĉe barbiro.

Legante revuon en barbirejo, dum la barbiro tondis al mi la harojn, mi trovis en ĝi antikvan, sed saĝan lecionon, presitan inter du futurismaj versoj kaj sporta kroniko — tio, kio igis la frazon de mi notitan kaj aliajn same presitajn similaj al konfitaĵoj, per kiuj la konfistoj beligas siajn dolĉaĵojn.

La leciono de tiu frazo — antikva, sed saĝa, kiel mi jam akcentis — estas jena: "Plenumu vian devon, apliku vian rajton".

Fakte, bone agas tiu, kiu tiel faras. Sed mi ne scias, ĉu tiu, kiu skribis la lecionon, faris kiel Ja apotekistoj, kiuj ne englutas la drogojn, kiu ili mem preparas kaj rekomendas...

Se la tuta homaro konvinkigis pri

LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

(B. L. E.)

(Sociedade reconhecida de utilidade pública pelo Decreto n. 4.356, de 26 de Outubro de 1921)

A UNIÃO FAZ A FORÇA

Estatutos

Art. 1.º — A Liga Esperantista Brasileira (B.L.E.), fundada em 21 de Julho de 1907, com sede na cidade do Rio-de-Janeiro, tem por fim:

- dirigir a propaganda geral do Esperanto no Brasil;
- fazer propaganda do Brasil no estrangeiro por meio do Esperanto;
- coligar e auxiliar os grupos esperantistas;
- organizar regulamentos para exames de Esperanto e dar os respectivos diplomas;
- promover a criação de cursos superiores e por correspondência;
- representar a opinião dos esperantistas que lhe forem filiados;
- superintender a organização de congressos brasileiros de Esperanto;
- editar o boletim "O Brasil Esperantista".

Art. 2.º — A Liga Esperantista Brasileira, dentro dos limites permitidos pela legislação brasileira, é neutra em matéria de nacionalidade, raça, religião, política e questões sociais.

Art. 3.º — A Liga Esperantista Brasileira consiste de:

- membros isolados;
- membros pertencentes a grupos;
- membros benfeitores;
- membros honorários;
- membros cooperadores;
- grupos filiados (sociedades, associações, clubes, etc.).

§ 1.º — São considerados fundadores todos os membros que se achavam quites em 13 de Dezembro de 1913.

la saĝo de tiu leciono, tiu ĉi planedo estus la plej bona el la mondoj.

Tamen okazas, ke ni ĉiuj volas havi tre limigitajn devojn kaj ampleksajn rajtojn.

Ni ĉiam trovas rimedon diri al ni mem, ke tia aŭ alia devo ĝuste ne estas... devo.

Kaj, multfoje, kiam ni volas apliki rajton, ni trovas iun, kiu ne permesas tion, ĉar li pensas, ke tiu rajto... nur al li apartenas.

La leciono do estas admirinda.

Sed ni ĝin lernas nur ĉe la flanko, kiu konvenas aŭ plaĉas al ni.

Se ne estus tiel, Eŭropo ne estus nun en milito kaj la fabrikistoj de armilaroj kaj municioj ne amasigus miliojn. (D. B.) (Domingos Barbosa).

Tradukis: A. Couto Fernandes

§ 2.º — São membros isolados todos os que pagam uma contribuição anual fixada cada ano pela Diretoria da Liga, mais uma quota destinada à organização internacional a que fôr filiada a mesma Liga.

§ 3.º — São membros pertencentes a grupos todos os sócios de grupos filiados à Liga, que adiram a esta, pagando a quota de membro isolado, com a redução fixada pela Diretoria da Liga.

§ 4.º — E' membro benfeitor toda pessoa que fizer à Liga uma doação de, pelo menos, 300\$000, ou que tenha feito donativo equivalente.

§ 5.º — E' sócio honorário toda pessoa que prestar grandes serviços à Liga. Este título só pode ser concedido em sessão ordinária ou extraordinária.

§ 6.º — São membros cooperadores as pessoas que, não pertencendo ao quadro da Liga, prestarem serviço considerado pela Diretoria de utilidade para a propaganda do Esperanto.

§ 7.º — São grupos filiados aqueles que, aceitando estes estatutos, contam pelo menos cinco sócios inscritos na Liga.

Art. 4.º — Todo membro isolado ou pertencente a grupo, que durante o ano corrente, não obstante ter sido advertido, não tiver pago sua quota, é considerado demissionário.

Art. 5.º — Os membros da Liga pertencentes às categorias a, b, c, e d são também membros da associação internacional.

Art. 6.º — A Liga não intervem nas questões que dizem respeito à vida interna dos grupos filiados, que podem livremente agir, segundo seus estatutos. Estes, porém, devem ser aprovados pela diretoria da Liga.

Art. 7.º — Os membros da Liga tem direito a:

- receber gratuitamente o boletim oficial da Liga;
- gostar de abatimento nos livros ou em outras publicações feitas pela Liga.

Art. 8.º — A Liga Esperantista Brasileira reunir-se-á em sessões ordinárias de seis em seis meses, nas quais tomarão parte os membros da diretoria, os membros isolados, beneméritos e honorários ou seus representantes, e os delegados dos grupos filiados.

§ 1.º — Os membros da diretoria e os membros isolados, benfeitores e honorários tem direito a um voto cada um.

§ 2.º — Todo delegado de grupo filiado tem direito a tantos votos quantos forem os sócios de seu grupo filiados à Liga. Entretanto, o número de votos não pode exceder de vinte.

Art. 10.º — A Liga Esperantista Brasileira é dirigida por uma diretoria composta de um presidente, um vice-presidente, um secretário geral, dois secretários e um tesoureiro.

§ único — A diretoria é eleita durante os Congressos Brasileiros de Esperanto ou em sessão ordinária se houver um intervalo superior a dois anos entre dois congressos.

Art. 11 — Ao presidente compete:

- dirigir os trabalhos da Liga e representá-la no Brasil e no estrangeiro.
- preencher provisoriamente os cargos vagos na diretoria;
- nomear auxiliares no Rio-de-Janeiro, mesmo entre pessoas não pertencentes ao quadro social, e delegados nos

MONUMENTO DE CARLO BOURLET

(ESPERANTO-MODELO)

Carlo Bourlet foi grande e dedicado amigo do Brasil. Seu nome não deve desaparecer com o tempo, mas, ao contrário, tornar-se melhor conhecido e mais amado no futuro.

Em pequeno livro de leitura, destinado aos cursos superiores de esperanto, aparecem 112 páginas que farão conhecido e estimado pela juventude esperantista brasileira esse genial pensador desaparecido em 12 de Agosto de 1913.

1 vol. de 112 páginas, com o retrato de Carlo Bourlet, e encerrado com a palavra do Dr. Zamenhof, brochado 4\$000

Encomendas à Liga Esperantista Brasileira, Praça da República, 54, sob., Rio-de Janeiro.

lugares onde não existam grupos esperantistas ou delegado da associação internacional;

- convocar sessões extraordinárias, quando julgar conveniente.

Art. 12.º — Ao vice-presidente compete substituir o presidente, no caso de afastamento do presidente.

Art. 13.º — Ao secretário geral compete a direção da secretaria e, principalmente, a redação da correspondência para o estrangeiro.

Art. 14.º — Ao primeiro secretário compete redigir o protocolo das sessões, auxiliar o secretário geral na correspondência interna e também substituí-lo em seus impedimentos.

Art. 15.º — O segundo secretário auxiliará o primeiro secretário, ao qual substituirá em caso de impedimento.

Art. 16.º — Ao tesoureiro compete:

- receber as quotas e quaisquer donativos feitos à Liga e zelar por seus haveres;
- fazer os pagamentos autorizados pelo presidente.

Art. 17.º — A diretoria responde por seus atos perante os congressos e sessões ordinárias e extraordinárias, aos quais apresentará seus relatórios.

Art. 18.º — Os membros e grupos não respondem com quotas suplementares pelas dívidas feitas em nome da Liga.

Art. 19.º — Em caso de dissolução da Liga, seus haveres serão distribuídos entre os grupos filiados que nesse momento estiverem quites.

Art. 20.º — Os presentes estatutos só poderão ser reformados em sessão ordinária ou extraordinária.

ESPERANTO DENOVE UZATA EN HOLLYWOOD

PARAMOUNT STUDIO por la dua fojo
uzas Esperanton

Ĉar Esperanto estas neŭtrala lingvo ĝi denove estas uzata — la duan fojon — ĉe la *Paramount Studio*. La nova filmo nomiĝas "VICTORY" kaj ludas en ĝi la famaj filmsteloj Frederic March, Sir Cedric Hardwick, Betty Field, kaj aliaj bonaj geaktorj.

La filmo montras aventurojn sur tropikaj insuloj, ĉar oni ne volas montri la naciecon de iuj geaktorj, ili simple parolas en Esperanto.

M. G. M. kaj R. K. O. — la filmfarejoj kiuj jam uzis Esperanton en la filmoj "Idiot's Delight", "Virino de la Tropiko" kaj en "Konspiro" estis sekvata de Paramount Studio kun la filmo "Vojo al Singapuro" en kiu 200 insulanoj kantas la ĉefan fest-kanton kun teksto en originala Esperanto. Tiu ĉi lasta filmo montriĝas treege sukcesa kaj Paramount Studio intencas kunigi la samajn geaktorjn Bing Crosby, Dorothy Lamour kaj Bob Hope en nova simila filmo... espereble denove kun Esperanta kanto... se sufiĉe granda nombro da gesamideanoj montris sian aprobon kaj entuziasmon pri la uzo de nia lingvo en "Vojo al Singapuro" per kartoj kaj leteroj kaj gazetaj eltranĉaĵoj (sendu al mia adreso).

"Victory" estas la kvina filmo kun kelka uzo de Esperanto; sed nun ni ĉe pli energie laboru por akiri ke Esperanto estos la ĉefa lingvo en estontaj filmoj.

Joseph R. Scherer,

Prez. de E. A. N. A.

315 West 9 Streea, Los Angeles, Calif.

K A I G O O N

(ELPAROLU: KAJGUN)

(Kaigoon Chant) La festena kanto
en la filmo

La Vojo al Singapuro

Muziko de James V. Monaco — Liriko
de Kohnny Burke

Esperanto-teksto de Joseph R. Scherer
Filmfarejo: Paramount Studio Hollywood

Ĉefaj filmsteloj: Bing Crosby, Dorothy Lamour kaj Bob Hope; La festena kanto kantata de 200 insulanoj.

Virinoj:

Jen la luno nova
Brilas amon nur;
Kaj virino viron
ravas laŭ natur'.

Viroj:

Nun elektu iun kaj do dancu kun li
Vera koro batas ja en ĉiu de ni;
Preta kaj kapabla kaj volanta por vi;
Do ne staru vane, venu nu tien ĉi.

Virinoj:

Jen la luno nova
Brilas amon nur;
Kaj virino viron
ravas laŭ natur'.

Viroj:

(sekvas longa serio da gorgaj sonoj kun
Ugh, ugh... ĉu-ĉu... ĉi-ku... ĉi-ka... ktp.)

Ĉiuj:

Ĉielo ho, ke jen kar'dolĉulino vi
revados vi pri mi...
Pluvos kaj teruros la bru'
de fulmo kaj tondro en Kaigoon;
Ankaŭ iam venos malĝoj'
Sed nenio venkos l'amon nun...

Ĉielo ho, jen kison por sigeli
la promeson...

Eterne kune; du kiel unu...

Jen la luno nova
Brilas amon nur;
Kaj virino viron
ravas laŭ natur'.

Sekvas ripetado de la supraj linioj dum la tuta longa dancado; La virinoj elektas viron por danci kaj se li dancas kun ŝi, li aŭtomate fariĝas ŝia edzo. La voĉoj kaj la vortoj pli kaj pli miksiĝas tiel:

Viroj:

Nun elektu iun kaj do dancu kun li
Virinoj:

Anstataŭ konstanta soleco

Viroj:

Vera koro batas ja en ĉiu de ni
Virinoj:

Anstataŭ konstanta soleco

Viroj:

Jen la luno nova

Virinoj:

Jen la luno nova... ktp. ktp.

Estas tuj aperonta:

"Statistika Resumeto" rilata al
la jaro 1938. Eldono de la
"Brazila Instituto de Geografio
kaj Statistiko"

Petu ekzempleron al tiu Instituto
— Praça Mauá, 7-11° Rio de

Janeiro, Brasil.

J U V E L A R O

El la libro de MALBA TAHAN — "Lendas do Céu e da Terra"
(Legendoj el la Ĉielo kaj el la Tero)

RELIGIA EDUKADO

La religia edukado de la junularo ne povas esti limigata al la familia sino. La sentoj kaj principoj kulturitaj en la ombro de la patra hejmo devas pli-fortiĝi en posta kaj pli vasta religia edukado.

(Kardinalo Dom Leme)

LA ALMOZO

Almozo ne estas nur la monero, kiun oni donacas al la malriĉegulo, ĝi estas la konsolo donata al la korsuferanto, la instruado liverata al la malkleruloj, la bona konsilo donata al la erarintoj, la preĝo farata al la vivantoj kaj mortintoj.

(Frato Pedro Sinzing)

POR LEGI KAJ MEMORI

Ĉiu pseŭdosciencia libro, predikanta kontraŭ Dio, metita en la manojn de neklerulo, estas kiel ponardo oferita al estonta krimulo.

(Everardo Backheuser)

LERNEJO SEN DIO

Oni ne povas kompreni lernejon sen Dio, same kiel oni ne komprenas familion sen Dio. Kiam mankas Dio, la idoloj surtroniĝas.

(Tristão de Alencar)

LASTAJ VORTOJ

Fine, amikoj el mia animo, fine, la plej bona leciono de mia sperto. De tio, kion mi observadis, la resumo enspaciĝas en tiuj ĉi kvin vortoj: Ne estas justeco sen Dio.

(Rui Barbosa)

POR LEGI KAJ MEMORI

La aferetoj estas etaj aferoj; sed esti fidela ĉe la etaj aferoj estas afero.
(H. Dodswoth)

Esperantigis:

MALNOVA ESPERANTISTO

ESPERANTISTA DEVO:

Varbu unu novan esperantiston

en 1940

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS. Manaus. — Interesa artikolo titolita "Patriotisma laboro". verkita de s-ro Sebastião Augusto, aperis sur la kolonoj de la gazeto "Diário da Tarde", kiu ankaŭ publikigis duan alian artikolon pri la neforgesebla generalo Moreira Guimarães. S-ro Sebastião Augusto, kiu estas delegito de IEL, klopodas por fondi esperantistan grupon kun la helpo de kelkaj staj instruistoj.

CEARÁ. Fortaleza. — Sur la unua paĝo de la gazeto "O Povo" d-ro Democrito Rocha, ĝia direktoro, skribis interesan artikolon, per kiu li klarigas al demandinto, kial li povas skribi ekzate siajn "Primilitajn Kronikojn". Li diras, ke estas tre valora al li la lernado de Esperanto. El libroj, gazetoj, prospektoj, leteroj kaj poŝtkartoj redaktitaj en tiu ĉi helplingvo li elĉerpas aktualajn kaj detalajn elementojn por siaj kronikoj.

La aninoj de "Katolika Esperantistina Grupo" organizis, la 14an de Aprilo, pere de la stacio de "Ceará Rádio Clube" (PRE9), belan perradian festeton honore de sia instruanto, d-ro Democrito Rocha, kies naskiĝa datreveno tiam okazis. Partoprenis la festeton f-inoj Neusa Nepomuceno, Bia Evangelista, Guiomar de Aquino, Eurinice França, Maria Stael Porto kaj Zeneida Porto. La programoj konsistis el salutoj en la portugala kaj esperanta lingvoj al d-ro D. Rocha, kantoj de la melodio "Paca Nokto", de la "Internacia Marŝo", de Eustorgio Wanderley, kaj de la esperantista himno kaj deklamado. "O Povo" detale priskribis tiun festeton. Al d-ro Democrito Rocha niajn korajn gratulojn.

"Numária", oficiala publikigaĵo de la *Filatelio kaj Numismatika Societo*, kies adreso estas — Caixa postal 72 — en artikolo ilustrita per klišo enhavanta faksimilon de la esperanta stampo uzita dum la "Unua Juneca Ekspozicio Filatelio", okazinta en Belo Horizonte, parolis pri la stampo en Esperanto uzita ĉe la poŝtagentejo instalita en la ejo de la Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro.

Icó. — Je la 14a de Aprilo en la "Kolegio Senhor do Bonfim" estis inaŭgurita nedeviga kurso de Esperanto, kiun direktas s-ro Julio Maciel, konata intelektulo, antaŭ nelonge eklerninta tiun lingvon.

RIO GRANDE DO NORTE. Natal. — S-ro Moacir S. Cunha, perkorespondada lernanto de BLE, intencas, tuj kiam li finos sian kurson, fondi es-

perantistan grupon. La gazeto "O Estudante" aperigis artikolon titolitan "Esperantismo", de li verkitan.

PERNAMBUCO. Recife. — Per telegramoj senditaj de f-ino Artemisa de Araujo kaj de la estrataro de "Pernambuka Esperanto-Asocio" ni eksciis pri la morto de nia fervorega samideano Odilon Vidal de Araujo, okazinta la 3an de Junio. Lia morto suferigis la korojn de ĉiu esperantista koninta liajn valorajn laborojn por Esperanto.

Li estis vera apostolo. Lia entuziasmo por la interna ideo de Esperanto estis sensanĝa, de kiam li komencis ĝian lernadon ĝis lia morto. F-ino Artemisa de Araujo, responde al telegramo sendita de la prezidanto de BLE al lia familio, skribis kortuŝan leteron, per kiu ni eksciis, ke, kelkajn momentojn antaŭ sia morto, li preĝis ankaŭ en Esperanto. Je la 12a de Junio okazis kunveno de la tiea Asocio. Laŭ propono de ĝia prezidanto, d-ro Aguinaldo Lins, oni decidis, ke la kurso de Esperanto funkcianta en ĝia sidejo estu de tiam nomata "Odilon Araujo" kaj estu eldonata speciala numero de "Pernambuco Esperantista" kun lia portreto kaj artikoloj, leteroj kaj telegramoj pri li. Lin anstataŭis ĉe la direktado de tiu bulteno s-ro Antonio Jacome de Araujo, lia lerninto kaj ano de nia Ligo. D-ro Aguinaldo Lins, ferman- te la kunsidon, petis al ĉiuj geasocianoj, ke, kiel honoron al la kara mortinto, ili vigle laboru por Esperanto, al kiu li dum du jaroj sin tute dediĉis.

Aperis la Aprila kaj Maja numeroj de "Pernambuco Esperantista", kiuj enhavas diversajn literaturajojn de pioniroj de la Esperanto-movado. La lasta numero publikigis la tezon titolitan "Esperanto kiel lingvo de la poezio kaj kinematografo", kiun s-ro Jaco do Rego Monteiro prezentis al la 9a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio-de-Janeiro dum la jaro 1936a.

Caruará. — La 14an de Marto, ĉe la sidejo de "Escolas reunidas Municipais 15 de Outubro", kiu estas ankaŭ sidejo de "Grupo Esperantista Couto Fernandes", oni inaŭguris kurson de Esperanto kun la ĉeesto de reprezentanto de la loka urbestro. La gupó ankoraŭ ne aliĝis al la nacia kaj internacia Ligoj.

Garanhuns. — En kunsido okazinta en "Kolegio 15 de Novembro" la librotenistaro fininta sian kurson en 1939 oferis al tiu edukejo sian diplomigan bildon pere de sia prezidanto, prof.

Uzai Canuto, amiko de Esperanto. Parolante pri la diversaj alegorioj, kiuj vidigas sur la bildo, li reliefigas la verdan stelon klare videblan, dirante, ke ĝi estas la signo de la Espero por ĉiuj, kiuj revas pri tre feliĉa epoko kiam ĉiuj homoj interkomprenigas perfekte per komuna helplingvo. Ferman- te sian paroladon li laŭdis la senlakan batalanton por Esperanto, s-ron Ismael Gomes Braga, patronon de la tiea esperantista grupo.

"O Monitor", grava katolika organo, publikigis longan artikolon de s-ro Otaciano Acioli, instruisto en "Ginásio Diocesano" kaj "Seminário Diocesano", dua sek. de la grupo kaj ano de nia Ligo, montrantan la progresojn de Esperanto ĉe la katolika medio. Li faris du paroladetojn pri "Kompara lernado de Esperanto kaj portugala lingvo" en tiu gimnazio kaj unu en la seminario.

La kurso de Esperanto regule funkcias ĉiuvendrede en la sidejo de la "Sindikato de la Komercoficistoj", ĝentile cedita de ĝia prezidanto, s-ro José Vieira Filho. Malfermiĝis tie speciala kurso por infanoj.

La gazeto "Garanhuns Diário" publikigis kelkajn artikolojn pri Esperanto aperintajn en esperantistaj gazetoj.

BAÍA. Alagoinhas. — Laŭ letero sendita de nia fervora samideano s-ro Carlos de Souza Cunha, loka delegito de IEL, la propagando de Esperanto iras kontentige. La kunvenoj de la "Esperanto-Klubo de Alagoinhas" okazas nun en vasta salono de "Rádio Clube". Ĉar en ĝi estas fortpiano, la ge-klubanoj kantas la himnon kaj aliajn kantojn en Esperanto. Tri klubanoj aliĝis al BLE kaj tial la Klubo fariĝis fakte al ĝi filiita. Remalfermiĝis la nunjara kurso de Esperanto.

STATO RIO DE JANEIRO. Campos. — Fondiĝis "Societo Esperanta Lumo kaj Konkordo", kies sidejo estas: Rua Formosa, 218. Malfermiĝis kurso de Esperanto, direktata de d-ro Clovis Tavares. Fondiĝis ankaŭ "Grupo Esperantista Tria Jarmilo", kies instruisto estas la sama de la alia grupo. Jen ĝia adreso: Rua Carlos de Lacerda, 151. Ni ne ricevis detalajn informojn. "Raio de Luz", oficiala organo de Spiritista Centro "Fido, Espero kaj Amo", publikigis notojn pri Esperanto.

S. PAULO. S. Paulo. — "S. Paŭlo Esperanta Klubo" daŭrigas sian viglan laboron por la propagando de Espe-

ranto. Regule vizitataj funkcias du kursoj por komencantoj, unu en S. Paulo kaj alia en Santo André, sub la direkto de d-ro Geraldo de Azevedo, kaj unu por progresantoj direktata de s-ro Mario Rodrigues Monteiro. En Junio malfermiĝis alia kurso, kiun direktas s-ro Valenteo A. Rodrigues. Pri la radia kurso ni detale parolas aliaĵe. Estas elektita bibliotekisto s-ro Armando Cambriaghi, ano de B.L.E.

MINAS GERAIS. *Belo Horizonte.* — La 20an de Januaro fondiĝis "Grupo Esperantista Humberto de Campos", kies adreso estas: *União Espirita Mineira, Rua Curitiba, 636.* En ĝi funkcias kurso direktata de inĝ. Aristoteles Juvenal de Faria Alvim, ano de BLE, al kiu tamen la grupo ankoraŭ ne aliĝis.

S-ro Claudovino de Carvalho Junior daŭrigas sian laboron por Esperanto. Li forte interesiĝas, por ke Esperanto estos uzata de la "Regiona Filatelio Ekspozicio de Minas Gerais", okazinta en la ĉefurbo, de la 14a ĝis la 21a de Julio nunjara, por memori la Jarcenton de la Poŝtmarko. Nia Ligo donacos librojn en kaj pri Esperanto, kiel premiojn, liverotajn al ekspozicieintoj. laŭ kriterio de la Organiza Komitato.

Carangola. — La 2an de Aprilo fondiĝis "Grupo Esperantista de Carangola", kies sidejo estas ĉe: *Rua Olegario Maciel, 71.* Funkcias kurso direktata de s-ro Bras Cosenzo. Pri la fondo de tiu klubo kaj de alia nenium oficialan informon ni ricevis.

Juiz de Fora. — La 4an de Majo fondiĝis, ĉe *Instituto Grambery, "Centro Esperantista Gramberyense"*. Tio okazis dum solena kunsido kun la ĉeesto de ĝia rektoro, instruistoj kaj 800 lernantoj. La rektoro malferminte la kunsidon deklaris fondita la Centron kaj legis la nomojn de ĝia unua estraro. Jen ili: Prez. — d-ro Benjamin Colucci, sek. — s-ro prof Vittorio Bergo kaj kas. — s-ro rektoro Irineu Guimarães. Poste li prezentis al la ĉeestantoj s-ron Ismael Gomes Braga, kiu, ricevinte specialan inviton por esti la kunsida oratoro, faris interesan paroladon, kiun ĉiuj varme aplaudis. S-ro Braga donacis al la instruistoj de la Instituto, kiuj helpis la organizadon de l' Centro, ekzemplerojn de la Sankta Biblio en Esperanto. S-ro rektoro fermante la kunsidon deklaris, ke li prenas sur sin la respondecon pri la regula funkciado de la kurso de Esperanto en la Instituto.

D-ro Benjamin Colucci estas malnova esperantisto kaj jam multe laboris por la propagando de Esperanto. Li estis unu el la organizintoj de la brila

RIO DE JANEIRO, BRAZILIO



GARDENO DE GLORO.
(Fot. donacita de la Divizio de Turismo de "DIP").

4a Brazilia Kongreso de Esperanto, okazinta en tiu industria urbo. La 16an de Oktobro 1910a li ricevis la ateston pri lernado kune kun naŭ aliaj esperantistoj, el kiu ni citas d-ron Eduardo de Menezes, jam mortintan, kiu prezidis tiun kongreson, kaj s-ron Morais Schimitz, kiu estis estrarano de la tiama "Grupo Esperantista de Juiz de Fora".

Ĝuste en la sama tago, vespere, en salono ĝentile cedita de Grupo Espirita "Venâncio Café" okazis kunsido, dum kiu paroladis s-ro Ismael Gomes Braga. Tiam fondiĝis "Grupo Esperantista de Juiz de Fora" (*Rua S. Antonio, 110*). Jen ĝia estraro: Prez. s-ro Orville Derby A. Dutra, sek. — s-ro Antonio Bernardino de Oliveira kaj kas. — s-ro Marcos Couto. Direktas kurson poste malfermitan s-ro Morais Schmidt.

S. Sebastião do Paraíso. — "O Liberal" publikigis interesan artikolon de s-ro Luiz Anacleto de Sillos, de kiu ni ricevis leteron petante informojn pri la fondo de grupo, kiun li kaj s-ro Nestor Lacerda intencas fondi. S-ro Sillos ankaŭ skribis leteron al la estraro de S. Paŭlo Esperanta Klubo, per kiu li informas ĝin, ke li bone aŭdas la esperantan programon ĉiutage disradiatan de "Rádio Piratininga".

GOIAZ. Goiana. — Ni ricevis leteron de s-ro Geraldo Inácio Berquó (*Rua Oito*), kiu estas ano de grupo esperantista tie fondita en la komenco de l' nuna jaro. Li petis informojn pri ĝia aliĝo al BLE. Al li ni sendis esperantaĵojn.

RIO-DE-JANEIRO. — Je la 8a de

Junio okazis ĝenerala kunsido de BLE, dum kiu oni reformis ties Statuton kaj elektis novan estraron. En speciala artikolo ni detale parolas pri tiu kunsido kaj publikigas la reformitan Statuton.

S-ro A. Couto Fernandes fermis sian kurson funkciintan ĉe la sidejo de la Societo de Geografio kaj tie malfermis alian kurson, kiu funkcias mardes kaj ĵaŭde, de la 17a ĝis la 18a horo.

La "Brazilia Spiritista Ligo" dum la kunsido okazinta la unuan de Majo, decidis meti en la protokolon honorigan esprimon al BLE pro ĝiaj viglaj laboroj por Esperanto. Sciigis tiun decidon al la prez. de BLE s-ro Deolindo de Amorim, ĝenerala sekretario. Per telegramo BLE dankis la honoron al ĝi faritan.

S-ro Ismael G. Braga faris ĉe la Spiritista Federacio paroladon pri la mesaĝo de Emmanuel pri la "Misio de Esperanto". Ĉeestis ĝin s-roj Geraldo de Azevedo kaj Osvaldo de Morais, estraranoj de S. Paŭlo Esperanta Klubo. "O Reformador", oficiala organo de tiu Federacio, publikigis dum la jaro 1939 33 artikolojn pri Esperanto krom notoj kaj anoncoj pri esperantaj libroj.

Notoj pri Esperanto aperis en "Jornal do Comercio", "Correio da Manhã", "Vanguarda", "Diario da Tarde", kaj aliaj. "Jornal do Brasil" publikigis artikolon de D-ro Domingues Barbosa kaj "O Farmacêntico Brasileiro" portugalan tradukon de artikolo de d-ro Briguet, el Francujo, titolita "La ŝtalaj pulmoj". faritan de s-ro A. Caetano Coutinho.

A. C. F.

Liga Esperantista Brasileira

DIRETORIA

Presidente perpétuo:
 Engenheiro Alberto Couto Fernandes
 Vice-presidente:
 Dr. Carlos Guimarães Domingues
 Secretário geral:
 Engenheiro Hernani da Motta Mendes
 1.º Secretário:
 Sr. João Telles da Silva
 2.º Secretário:
 Senhorita Iraní Baggi de Araujo
 Tesoureiro:
 Sr. Odillo Pinto.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Jen estas la nomoj de la delegitoj ne aperintaj en la JARLIBRO — 1940:

- MOSSORÓ (Rio G. do Norte). 20.000.
D. Targino Soares, Rua Padre João Urbano, 242.
- RECIFE (Pernambuco). 500.000.
FD (Filatelio) Fino Elza Vidal de Araujo, publika oficistino, Rua do Príncipe, 398.
- RECIFE (Pernambuco) 500.000.
FD (Fino Besilda Vidal de Araujo, studentino, Rua do Príncipe, 398.
- RECIFE (Pernambuco) 500.000.
FD (Kalkulado) S-ro Eugenio de M. Pais Bareto, kalkulisto, Caixa postal 297.
- RECIFE (Pernambuco) 500.000.
FD (Dektivismo) Antonio Jacome de Araujo, komercisto, Rua do Príncipe, 410.
- RECIFE (Pernambuco) 500.000.
FD (Farmacio) Jaaziel de Souza Comos, komercisto, Rua 21 de Abril, 384, Afogados.
- RIO-DE-JANEIRO. 2.000.000.
FD (Geologio) D-ro Anibal Pinto de Souza, ingeniero, Rua Cascata, 51, Tijuca.
- PIRAPORA (Minas Gerais).
D. I. Matos Quinaud, ĵurnalisto.

ADRESSANGOJ:

- Komitano — D-ro Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim, 27, Ap. 61, Rio-de-Janeiro.
- MANAUS (Amazonas) 70.000.
D. Sebastião Augusto, Rua dos Andradas, 76.
- SANTO ANDRE' (São Paulo) 30.000
D. Isaac Julio Barreto, Caixa postal n. 9.
- PORTO ALEGRE (Rio G. do Sul) 450.000.
FD. Ary Zamora, Rua S. Carlos, 1192.

JARLIBRO DE I E L

Jam aperis la JARLIBRO DE I. E. L. 1940: UNUA PARTO. 176 paĝa.

Notu, ke ĉi tiu estas nur la unua parto. La dua parto, kies enhavo estos la Landaj Raportoj, Lernejoj en kiuj oni instruas Esperanton, alia propaganda informo (eble ankaŭ nova fakvortaro) kaj ŝanĝoj en kaj aldonoj al la Delegitaro, aperos en la aŭtuno.

Neaĉetebla, sed ricevebla nur de individuaj membroj de I. E. L. Bazaj kotizoj:

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA E INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

QUOTA ANUAL

1940

Categoria	socio	
	isolado	socio de grupo filiado
AM (membro simples)	15\$000	10\$000
MJ (recebe o "Jarlibro")	25\$000	20\$000
MA (recebe o "Jarlibro" e a gazeta mensal "Esperanto-Internacia")	50\$000	45\$000

ENIGMO

Jen estas la solvo de la enigmo aperinta en nia antaŭlasta numero:

Komisaro — Robinson.

Direkttilisto — Smith.

Subdirekttilisto — Jones.

Ricevis la unuan premion (ekz. de Fundamenta Krestomatio) s-ro Almir Morais, Rua Jorge Rudge, 117-1º and., Rio-de-Janeiro, kaj la dua premio (ekz. de "Veterano") s-ro Hermes Pitta, Ladeira da Soledade, 117-1º and., Salvador, Baía.

Donacis la premiojn s-ro Mario G. Rodrigues, vicprezidanto de *São Paulo Esperanta Klubo*.

FILATELIA E ESPERANTO

"A Bélyeg" (O Selo), gazeta de junegaj filatelistas húngaros, resolveu usar o Esperanto e iniciar uma seção especial com um curso desse idioma. Endereço: Révay — u. T. Szeged. Hungria.

ALBUMO DE BULGARAJ ESPERANTISTOJ 1939.

ARANGIS KAJ ELDONIS: BELCO TOD. OKTOMVRIJSKI.

PAGOJ 146. FORMATO 23,5|15. PREZO 50 BULGARAJ LEVOJ, 7 RESPOND-KUPONOJ AŬ EGALVALORO.

HAVEBLA DE LA ELDONINTO: "Spiktur" INTERNACIA INSTITUTO.
 50, STR. ALABIN SOFIA (BULGARUJO).

KORESPONDADO

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn la jenaj junaj filatelitoj de "Colégio 15 de Novembro":

Ubiraci Silva Barbosa (14 jara), José Arnaldo Nunes (13 jara) kaj Luiz Vieira (13 jara) — Grupo Esperantista "I. G. B.", Praça D. Moura, 334. GARANHUNS. Pernambuco. Brasil. samideanoj.

S-ro Manuel Gil Rodrigues, Rua do Mirante, 14. SILVES. Algrave. Portugal — deziras korespondi kun brazilaj samideanoj.

Grupoj Aligintaj al B. L. E.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO" (1906). Sidejo: Praça da República, 54. Rio-de-Janeiro.

SUDBRAZILA ESPERANTISTIGILO. (1927). Sidejo: Rua dos Andradas, 1431. Porto Alegre. Rio Grande do Sul.

CENTRO ESPERANTISTA DE SANTOS. (1932). Sidejo: Rua Baía, 57. Santos. Est. São Paulo.

GRUPO ESPERANTISTA DE MONTE APRAZIVEL. (1935). Sidejo: Monte Aprazivel. Est. S. Paulo.

ESPERANTA GRUPO DE BAÍA. (1936). Sidejo: Rua Bangala, 18. Salvador. Baía.

S. PAŬO ESPERANTA KLUBO. (1937). Sidejo: Rua B. Vista, 15-4.º and. sala 11/12. São Paulo.

PERNAMBUKA ESPERANTO-ASOCIACIO. (1937). Sidejo: Rua do Príncipe, 398. Recife. Pernambuco.

ESPERANTO - KLUBO DE SANTO AMARO. (1937). Sidejo: Av. Viana Bandeira, 14. Santo Amaro, Baía.

GRUPO ESPERANTISTA "ISMAEL GOMES BRAGA". (1938). Sidejo: Praça D. Moura, 334. Garanhuns, Pernambuco.

SOCIETO ESPERANTISTA "KONKORDO" (1939). Sidejo: Praça 11 de Junho, 49. Rio-de-Janeiro.

GRUPO ESPERANTISTA DE ARAGUARI. (1939). Adreso: Caixa postal 73. Araguari. Minas Gerais.

KATOLIKA ESPERANTISTINA KLUBO. (1939). Sidejo: Rua Benfica, 2457. Fortaleza. Ceará.

ESPERANTO-KLUBO DE ALAGOINHAS. (1940). Sidejo: Rua 24 de Outubro, 12. Alagoinhas. Baía.

BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas: ALBUMO-ADRESARO de la Esperantistoj, kun 48 paĝoj. Eldonita de s-ro Dimitr Ivanov — 80 N. Riloki, Ruse, Bulgarujo. Prezo: 3 respond-kuponoj. Ĝi enhavas ĉirkaŭ 150 klišojn kun portretoj kaj pejzaĝoj kaj granda kvantoda adresoj.

ARISTOKRATIE. Dumonata revno pri arto kaj literaturo, redaktita en franca, rumena kaj esperanta lingvoj. Redaktejo kaj Administratejo: Bois de la Solitude. Soutraine par Rantigny (Oise), Francujo. Jarabono: 45 fr. frankoj.

BATALO. Rakontoj de Nikolaj Rajnov. El la bulgara lingvo tradukis At. Nikolov. Eldonejo "Fratego", Selievo. Bulgarujo. S-ro Nikolaj Rajnov, kies 25-jara literaturan jubileon oni festis la pasintan jaron, estas fama beletristikisto, historiisto de la arto kaj universitata profesoro. Prezo: 2 resp.-kuponoj.